

LA

VERDA

STELO



**ESPERANTO
NEDERLAND**

**SEKCIO GRONINGEN-DRENTE
&
FRISA ESPERANTISTA RONDO**

Septembro 2010



LA VERDA STELO

eldono de

ESPERANTO NOORD-NEDERLAND

ESPERANTO-KLUBO GRONINGEN-DRENTE

prezidanto

s-ro J.B. Swenker
T.W.S. Mansholtstraat 25
9728 MC Groningen
tel. +3150 527 45 72
retadreso:
johan.swenker@xs4all.nl

sekretariejo

s-ino N.R. Kiel-Klunder
G. Sterringastraat 60
9728 VV Groningen
tel. +31505251436
retadreso: nrkielklunder@hotmail.com

kasisto

s-ro L. Staghouwer
Julianalaan 25
9781 ED Bedum
tel. +3150 301 40 15
retadreso: luitstaghouwer@home.nl

FRISA ESPERANTISTA RONDO

s-ro W. Akkerman
Westerein 14 a
8571 GB Harich (Frl)
tel. +3151 460 22 72
retadreso: wiebrenakkerman@hetnet.nl

ttt-ejo

<http://pingveno.nl/klubo>

kunvenejo

Dreesflat, W. Dreesstraat 1
ĉiun alternan ĵaŭdon ni kunvenas
de la 19h45 ĝis la 21h45

Esperanto-centro

T.W.S. Mansholtstraat 25
9728 MC Groningen
J.B. Swenker, tel. +3150 527 45 72

redakcio

J.B. Swenker, N.R. Kiel-Klunder
retadreso: nrkielklunder@hotmail.com



Enhavo

- 3 Klubkunvenoj
- 4 Naskiĝtagoj
- 5 Pri la nordo
- 8 Budoj
- 9 Esperanto en Leeuwarden
- 9 Subvisurgo
- 10 Ŝipveturmuzeo
- 11 Ni diru la veron!
- 12 Trajnvojaĝo
- 13 Ludo de la Nuda Vero
- 14 Stichting Kune
- 15 KELI-kongreso
- 15 Enigmoj: solvoj

Contributie Esperanto Noord-Nederland 2009

Afdelingslid (incl. abonnement LA VERDA STELO)	€ 12,50
Gezinslid	€ 6,25
Donateur (minimaal)	€ 7,00
Abonnement LA VERDA STELO	€ 7,00
Over te maken op ING banknr. 3822472 t.n.v. ESPERANTO NOORD-NEDERLAND te Bedum	

Leden van Esperanto Noord-Nederland worden geacht lid te zijn van **ESPERANTO NEDERLAND**.

Vandaar dat wij hier ook het rekeningnummer ervan vermelden:
78 68 44 167 (TRIODOS-Bank), t.n.v. Esperanto Nederland, Middenweg
587, 1704 BH Heerhugowaard.

Lidmaatschap (incl. abonnement Fen-X)	€ 27,50
Gezinslid	€ 8,00

2	septembro	ferioj
16	septembro	sanktuloj
30	septembro 20.15	Bjalistok-ludo
14	oktobro	malferma vespero
28	oktobro	vojaĝo al Ulanbatoro
11	novembro	intertajde marvadi
25	novembro	hobio
9	decembro 19.15	Zamenhof-tago
6	januaro	vivanta gazeto

- ŝanĝoj rezervitaj -

la plej freŝajn novaĵojn kaj
ŝanĝojn vi trovos en nia retejo
sub la rubriko

Aktuale
<http://pingveno.nl/klubo>

Pri la kovrilpaĝo

Dum la somero naĝis cigno en la 'Hoornse Meer', apud nia kunvenejo la Dreesflat. Tiu cigno estas farita el PET-boteloj kaj ĝi estas arto.

La artisto estas Maria Koiĵck. Per la art-projekto de la cigno, ŝi petas atenton por media problemo. En la oceanoj flosas grandaj insuloj el plastiko. Kiam ŝi estis en Sierra Leono, ŝi vidis plaĝon kovrita per amaso da plastika rubaĵo. Kaj ŝi pensis: "kiom da rubaĵo ni devas produkti, ĝis Panjo Tero ne plu havas fekundan grundon sed nur plastikon?"

Naskiĝtagoj

septembro

- 3 W. Akkerman
- 7 M.F.W. Kruijswijk
- 17 H.W.T. van Hogen- Cornelissen
- 24 A.E. Van der Heij-Alblas
- 30 A.H. Thomas-Nitzsche

oktobro

- 2 R.M.Koopmans
- 3 D. van der Heijden
- 15 Ch.I. Behr-Kunst
- 29 A.M.H. Dodebier

decembro

- 1 R. Hofman
- 15 H. Molthoop
- 21 H. Leeuwerke-Kiers
- 30 R.J.Hettinga
- 31 A. Van der Heij

Ĉu via naskiĝtago ne aperas en la listo?
Tiam sciigu al Johan Swenker kiam vi naskiĝis.



Pri la nordo

18 marto 2010

La temo de la vespero estis stratnomoj.

Nelly, Johan kaj Ineke la 17-an de marto ĉeestis la inaŭguron de la nova konstruaĵo de la Comenius-lernejo en Leeuwarden. Tiu lernejo situas apud la Zamenhof-parko kaj la nova konstruaĵo nomiĝas "Zamenhof". La Esperanto-centro Groningen dum la inaŭgura tago havis budon en la lernejo. Sur la tablo oni prezentis librojn, diskojn, k.t.p. Bedaŭrinde

neniu petis informojn. La apuda budo kun trinkaĵoj ja allogis gastojn.

Nur du personoj venis al la budo de la Esperanto-centro: s-ro Dirk Rietdijk kaj s-ino Fien Koopmans. Ili hazarde promenis tra la Zamenhof-parko kaj vidis, ke okazas io eksterordinara en la lernejo. S-ro Rietdijk de nelonge instruas Esperanton al grupo da gelernantoj de alia lernejo en Leeuwarden: la Noordelijke Hogeschool.

Ĉeestis ankaŭ Nanne Kalma kaj Ankie van der Meer (Kajto), ili trifoje gvidis grupon de proksimume 50 "gelernantoj" kaj Richard van Schaik instruis la tri grupojn (en la tria grupo estis nur plenkreskuloj).

Dum la inaŭguro Kajto prezentis du kantojn.

Kompreneble ankaŭ "s-ro Zamenhof" ĉeestis. Kvankam ĉi tiu Zamenhof surhavis malmodernajn vestojn de gravulo, li tute ne aspektis kiel "nia" Zamenhof.

Johan demandis nin, ĉu ni scias kiu grava tago estis la pasinta dimanĉo. Neniu el ni sciis, ke estis "Pi-tago". Verŝajne nur matematikistoj scias (kaj interesiĝas) pri tiu

"Pi-tago".

Luit raportis pri sia vizito al la iama krozadŝipo "Rotterdam" en Roterdamo.

Wil vizitis en Meppel la Arkeon de Noa. La bestoj estas artefaritaj, sed aspektas laŭnature.

Konforme al la temo de la vespero ĉiu el ni siatempe parolis pri la persono, lau kiu oni nomis la straton en kiu li aŭ ŝi loĝas.

Grava fonto por ni estis Vikipedio, la libera reta enciklopedio. Johan konsultis ankaŭ la retpaĝojn de Genlias.nl kaj li konstatis, ke en Genlias.nl estas ortografia eraro.

Ni priparolis jenajn personojn: Theda Wilmina Scheltjea Mansholt (Johan), Geert Sterringa (Nelly), Juliana Louise Emma Marie Wilhelmina, i.a. princino de Lippe-Biesterfeld (Luit) kaj Christiaan Huygens (Wil).



Ne ĉiuj personoj estas same konataj, sed ĉies meritoj sufiĉas, por ke ili pluvivu sur stratnomtabulo.

15 aprilo 2010

La programo estis pri Beatrix Potter. Sed komence ni parolis pri ĉiaj aferoj. Priparolitaj aferoj estis ekzemple la estonta beneluksa kongreso en Antverpeno kaj la renkontiĝo en Subvisurgo la 5-an de junio.

Multe pli malfacila afero estis la jarkunveno de Esperanto Nederland, kaj precipe la propono de komitato pri la estonteco de Esperanto Nederland. Dum la jarkunveno Esperanto Nederland pritraktos la proponon en la posttagmezo. Ni decidis, ke ni pridiskutos la aferon la sekvantan klubkunvenon, do la 29-an de aprilo.



Duono de la ĉeestantoj jam dum multaj jaroj konas Beatrix Potter kaj precipe ŝiajn kreaĵojn kiel Petro la Kuniklo.

La aliaj antaŭe ne konis la verkiston de infanlibroj. Johan trinkas sian ĉiutagan tason da kafo el pokalo kun la teksto: "Once upon a time there were four little Rabbits, and their names were - Flopsy, Mopsy, Cotton tail, and Peter.

La tuta rakonto estas en la libroj, kiujn la aliaj kunportis.

Nelly montris grandan libron kun multaj rakontoj de Beatrix Potter. Ŝi havas anglan onklon, kaj tial ŝi havas la libron en la angla lingvo. Gonda kunportis la saman libron, sed en nederlanda traduko.

Originale la libroj de Beatrix Potter estas fakte nur libretoj. Ineke kunportis kelkajn. Ŝi foliumis ilin kaj subite rememoris la voĉon de sia patrino. Patrino kiu antaŭ multaj jaroj voĉlegis la rakontojn por la juna Ineke.

Beatrix Potter libertempis kaj poste vivis en la angla lagoregiono (Lake district). Nuntempe tiu regiono estas konata pro Beatrix Potter kaj oni tie vendas

memoraĵojn pri ŝi.

Nelly estas adepto de Beatrix Potter. La pasintan jaron ankaŭ ŝi libertempis en la angla lagoregiono. Do kompreneble ŝi kunportis kelkajn memoraĵojn al sia hejmo kaj al la klubo.

Fine de la vespero ni spektis la komencon de la filmo "Miss Potter" pri la historio de Beatrix Potter.

Estas amuza filmo: "kunikloj kun jakoj kun kupraj butonoj" diras la eldonistoj, "kiu elpensas tion". "Mi ne elpensas ilin" respondas Beatrix. "Ili ekzistas preskaŭ vere".



Kaj ni ĉiuj jam sciis, ke Beatrix fine venkis: per la "kunikla libro" ŝi enspezis tiom da mono, ke ŝi povis aĉeti domojn, bienojn, bienegojn.

29 aprilo 2010

Sesope ni kunvenis. Johan voĉlegis la protokolon de la antaŭa kunveno, post kio Wil raportis pri sia vizito al la Malferma Tago de UEA. Ŝi ĉeestis tie prelegon de Mark Fettes, de Nora Caragea, de Rob Keetlaer, kaj spektis la filmon: Heidi en Indonezio, ĉe kiu Heidi Hoen mem ĉeestis por respondi demandojn.

Ineke sciigis al ni, ke Koos kaj Frans edziĝis la 31-an de marto post 31 jaroj de

amikeco kaj kunloĝado. Gratulon por ili!

Ni decidis pri loko kaj horo de nia kunmanĝado en la 27-a de majo.

Ineke iros al la Azia Esperanto-Kongreso en Mongolio.

La kvinan de majo ni havos Esperanto-budon en la Urbo Parko inter la 12-a kaj la 18-a horo.

Wil vizitis s-inon Heide en Zwolle, kien ŝi transloĝigis. Riet salutas vin ĉiujn!

Luit tradukis tekston pri la temoj de la IKU (Internacia Kongresa Universitato) en la nederlandan lingvon por nia retpaĝaro.

La temo de la vespero: 'Vivanta Gazeto' estis ŝanĝita en 'diskuto pri la proponoj por ŝanĝoj en la funkciado de Esperanto Nederland'.

La 29-an de majo okazos la jarkunveno de Esperanto Nederland. Kelkaj rimarkigoj pri nia diskuto en la nederlanda lingvo:

De door een commissie gedane voorstellen lijken ons niet de oplossing voor de problemen waar Esperanto Nederland momenteel mee kampt, namelijk: geen secretaris, terugloop van ledenaantal, een gemiddeld erg hoge leeftijd van de leden, weinig tot geen nieuwe aanwas.

De voorstellen van de commissie behelzen: een nieuwe naam, nationaal en internationaal samenwerken met andere op taal gerichte verenigingen, een Nederlandstalig blad in plaats van FEN-X, een bestuur van slechts 3 leden, bijgestaan door 'werkgroepen'.

Volgens ons moet 'Esperanto' in elk geval als eerste woord in de naam staan om herkenbaar te blijven. Wat groei van het ledenaantal betreft: de instelling van de mensen is individueler geworden.

Daardoor is men minder dan vroeger

geneigd zich bij een vereniging aan te sluiten. Esperantisten zoeken in een vereniging ontmoeting met gelijkgestemden. Dat vinden ze in een vereniging van en voor esperantisten veel eerder dan in een vereniging die zich bezighoudt met taalkwesties in het algemeen.

Anders gezegd: leden van een Esperanto-vereniging voelen een onderlinge band, willen die band versterken, en samen proberen Esperanto te verbreiden. Esperanto Nederland heeft afdelingen. Je zou die ook werkgroepen kunnen noemen. Daar is geen statutenwijziging voor nodig. Alvorens de vereniging besluit tot samenwerking met andere op taalgebied actieve verenigingen, moet onderzocht worden of die verenigingen wel geneigd zijn met ons samen te werken. Besluit je tot contacten met op taal gerichte verenigingen in het buitenland, dan stellen we de vraag in welke taal dat moet plaatsvinden. In het Engels misschien?

Johan sendos nome de ni leteron al la estraro de Esperanto Nederland kun ni aj komentoj. Fine de la vespero Wil voĉlegis rakonteton el legolibreto, kiun antaŭ nelonge el la germana tradukis Nora Caragea.

Pri la diskuto en la jarkunveno kaj la konkludo rilate al la propono oni povas legi en FEN-X numero 4 julio-aŭgusto 2010.

27 majo 2010

Okope ni manĝis en la picorestoracio en la 'Hoornse Meer'. Wil ne manĝis kun ni, ŝi havis ekskurson al la 'Broeker veiling', sed post la manĝo ŝi trinkis kafon kun ni.

24 junio 2010

Schimmelpenninck Huys

Nur triope ni kunvenis en la Schimmelpenninck Huys. Ni trinkis kafon kaj teon en la ĝardeno. Ne estis vera ĝardeno, ni sidis ekstere en la korto. La vetero estis agrabla.



Ni babilis iom pri Esperantujo kaj aliaj aferoj. Wil intencas iri al Hungario por KELI-kongreso. Ŝi iros tien per flugmaŝino.

Scandinavisch dorp

Dum la somero ni regule kunvenas en iu restoracio en la ĉirkaŭaĵo. Fine de julio ses esperantistoj renkontis unu la aliajn je "Scandinavisch Dorp" en Eelde. Kiam mi alvenis, iomete post la deka matene, Luit Staghouver jam atendis nin.

Ineke Emmelkamp ĵus revenis el Mongolio. Ŝi jam multe diris pri la vojaĝo. Dum la vespera kunveno de la 28-a de oktobro ŝi prelegos pri sia vojaĝo per la transsiberia ekspreso.

19 aŭgusto

Je la deka mi rigardis eksteren. Pluvegis! Mi aktivigis mian komputilon.

'Buienradar' montris al mi: je la deka kaj kvardek estos seke! Bone, ni manĝos ekstere, apud la 'Dreesflat'.

Tiny Bulk estis kelkajn minutojn kun ni, sed bedaŭrinde ne estis varme! La forta vento estis malagrabla. Nur triope ni sidis sur la herbo kaj manĝis nian panon.

Budoj

Jam dum kelkaj jaroj la klubo estas en la urba parko dum la liberiĝa festivalo. Ni tiam havas budon por informi la vizitantojn pri Esperanto. Ĉi-jare ni duafoje renkontis Sandra Russell. Sandra estas direktoro de la fondaĵo Kune. Ŝi invitis nin ĉeesti la oficialan inaŭguron de ĝia nova oficejo.



La organizado donis al ni lokon tuj kontraŭ la podio. Kiam oni volas vendi vaflojn, kiel niaj najbaroj, tio estas bona loko. Multaj homoj venas al la podio, do al la budo. Sed se oni volas kun homoj paroli, tiu loko estas malbona. Pro la laŭta muziko oni ja ne povas aŭdi unu la alian. Feliĉe oni avertis nin, kaj eĉ helpis transloki la stablon al alia loko. Tiam ni havis la plej bonan lokon kiu estis havebla.

Bedaŭrinde ni ne povas mezuri ĉu estas efike ĉeesti dum tiaj festivaloj. Preskaŭ

neniam iu persono anoncas sin por lerni Esperanton. Sed tamen, multaj homoj ricevas informojn pri Esperanto. Ili precipe ricevas la retadreson de Esperanto-kursoj. Do eble, iom poste, Koos aŭ Wil havos novan lernanton pro la varbado dum ekzemple la liberiĝfestivalo.

Pro miskomunikado ni ne ĉeestis en la groningena urbo dum la KEI-semajno. Iel mi ne ricevis invitilon, kaj kiam mi petis informojn, mi jam estis tro malfrue. Iu persono kiu serĉis nian budon, rakontis ke estis sufiĉe da liberaj budoj. Do fakte, se ni estus irintaj, ni simple povus preni liberan lokon kaj fanfaroni pri Esperanto.

Esperanto en Leeuwarden

Dum la printempo Dirk Rietdijk, membro de Frisa Esperantista Rondo, instruis Esperanton al kelkaj lernantoj de Noordelijke Hogeschool Leeuwarden. Estis entuziasma grupo. Ili verŝajne per Interreto daŭre lernos Esperanton, ili ja estas studentoj pri komunikado.



Por danki lin ili invitis Dirk al restoracio por kune manĝi. Sur la foto Dirk sidas maldekstre en la mezo.

Subvisurgo

La Esperanto-klubo de Subvisurgo (Unterweser) fondiĝis antaŭ 15 jaroj. La jubilea renkontiĝo okazis la 5-an de junio en Brake, malgranda urbo en la regiono Subvisurgo. Tri membroj de nia klubo iris tien. Oni bonvenigis nin en restoracio, kie ni ankaŭ tagmanĝis.

En apuda salono oni montris lumbildojn pri la klubo. Tiel ni vidis bildojn de la Universala Kongreso en Roterdamo, bildojn de la dekjara jubileo, kaj bildojn de lokaj festoj. Unu el tiuj festoj iomete similas la florparadon de Eelde: multaj grupoj paradas tra la urbo per memfarita parada veturilo. Kaj vere, la Esperanto-grupo de Subvisurgo montris sin per granda veturilo al la vizitantoj de la parado.




Starante en koridoro inter ambaŭ salonoj, la prezidanto Anne Höpken inaŭguris la kunvenon. Kiel donacon ni kunportis kompaktdiskon de Kapriol!! Mi donis ĝin tuj post la oficiala kunveno. Mi eksplikis, ke nia klubo helpis verki la tekstojn, kaj ke du membroj de Kapriol!! estas membro

de nia klubo.

Post la tagmanĝo ni iris al la ŝipveturmuzeo. En la muzeo mi ne rajtis fari fotojn. Mi vidis interalie

- * ŝnurojn en malnova ŝnurfarejo
- * modelojn de multaj boatoj
- * ilojn kiel la bastono de Jakobo kaj sekstanto
- * varojn el Nederlando



La muzeo konsistas el du konstruaĵoj. Unu konstruaĵo iam estis la telegrafa oficejo. En la konstruaĵo oni funkciigis la optikan telegrafon. Sur la tegmento de la konstruaĵo grandaj montriloj montras la informojn, kiujn la sendanto sendas al la sekva telegrafa oficejo laŭlonge de la rivero.

Fine de la tago ni manĝis grandan torton, kaj denove babilis kun la esperantistoj el Subvisurgo kaj la aliaj gastoj. Precipe la bremenanoj petis de mi saluti vin ĉiujn.



Ŝipveturmuzeo de Brake

Profundiĝu en la fascinantan mondon de la ŝipveturado. En la nura muzeo de Malsupra Sakujo, kiu dediĉas sin al tiu ĉi temaro, atendu interesajn enrigardojn en la periodon de prospero de la transmara komerco sub la oldenburga flago.

Fokuso de la ekspozicio de la muzeo estas la 19-a jarcento, kiam la pli ol 280 velŝipegoj de tiu ĉi regiono hejmis sur ĉiuj maroj de la mondo. Pri tio respondis la grandeco de la oldenburga komerca ŝiparo, kies ankrejo troviĝis en la marhavenoj Brake, Elsfleth kaj Nordenham, proksime al tiu de Bremeno.

En 23 ŝipkonstruejoj en Wesermarsch estis konstruitaj elstaraj lignaj velŝipoj por la ŝipposedantoj de la regiono, de aliaj germanaj havenurboj kaj ankaŭ por eksterlandaj komisiantoj.

La ŝipveturmuzeo de Brake prezentas siajn multifacetajn trezorojn en du historiaj konstruaĵoj: telegrafturo de 1846, kiu restis kiel lasta atesto de la optika telegraflinio inter Bremerhaven kaj Bremen, kaj – ne for de tiu turo – en komercista kaj ŝipposedista domoj el la jaro 1808.

En la multampla kolekto de ambaŭ domoj oni povas malkovri interalie maloftajn kaj belajn objektojn pri la temoj

ŝipkonstruado, ŝipfarejoj, navigacio, kartografio, modelkonstruado, vojaĝ-memoraĵoj aŭ marista popolarto. Konatiĝu kun la historio de la unua germana ŝiparo kaj de ĝia admiralo Karl Rudolph Brommy aŭ miru pri la multnombraj atestoj de balenkaptado. Lasu vin ensorĉi fare de rekonstruita ŝipekipista magazeno el la tempo ĉirkaŭ 1900, de kahelita loĝoĉambro kaj de velfaristmetiejo.

Trovebla estas en domo Borgstede kaj Becker finfine la kabineto de la grava verkisto Georg von der Vring (1889 – 1968), kiu en sia romano "Die Spur im Hafen" ("La spuro en la haveno") metis monumenton al sia naskiĝurbo.

Ni diru la veron!

Kion respondi, kiam ĵurnalisto demandas jene: Kiom da homoj en la mondo parolas Esperanton?

Por doni la plej bonan impreson al la publiko, multaj el ni deziras doni ciferon sufiĉe imponan.

Ĉu indas redoni pli-malpli ruze elpensitajn ciferojn nedokumentitajn?

En gazetartikoloj kaj informiloj oni de tempo al tempo povas legi ciferojn ĝis 20 milionoj (!) da Esperanto-parolantoj. Eĉ al oficialaj instancoj penetris tiaj fantaziaĵoj: Dokumento de Eŭropa Parlamento asertis en 1980, ke (nur) en Eŭropo parolas Esperanton ĉirkaŭ dek milionoj da homoj. Povas esti, ke tiu dokumento asertas tion.

Tamen, kiam ni malfermas la okulojn por fronti la realan mondon, ni tuj komprenas, ke temas pri senenhava sensencaĵo.

Eblas kalkuli kiom da homoj pagis kotizon al organizo. Kiam oni sumigas la landajn asociojn kaj diversajn aliajn internaciajn

organizojn, oni povas trovi ciferon. Eĉ pri tiuj membroj ni ne scias, ĉu ili parolas Esperanton, aŭ ĉu ili nur pagas kotizon por subteni. Ni ne scias kiom da homoj lernis per kursoj, kaj tute ne eblas kalkuli la aŭtodidaktojn. Ĉu tiuj, kiuj iam lernis la lingvon, ankoraŭ memoras ĝin? Kaj ĝis kia grado ili devas regi la lingvon, antaŭ ol ni rajtas kalkuli ilin kiel 'Esperanto-parolantojn'?

Jen nur kelkaj necertaĵoj pri tiuspecaj nombroj. Neniu ĝis nun sukcesis dokumenti kiom da homoj kapablas paroli la internacian lingvon. Ne nur ni esperantistoj scias tion. Ankaŭ ĉiu normale informita eksterulo komprenas, ke altaj ciferoj indikas pli pri bonkoraj idealistoj, kiuj provas rozkolorigi sian fantazian mondon, ol ili indikas faktojn. Mia tasko estas informi pri la internacia lingvo, kaj la malfacile respondebla demando ofte aperas. Kion respondi? Estas tute akcepteble respondi: "Mi ne scias." Tio certe estas la respondo plej honesta kaj ĝusta. Tamen ni diru, kompreneble, ke Esperanto estas parolata en almenaŭ 120 landoj, do unu el la plej disvastiĝintaj lingvoj en la mondo. Ankaŭ tio estas impona. Kaj eĉ dokumentebla! Necerta takso laŭ mi povas esti bona laborrimedo por tiuj, kiuj okupiĝas pri ekzemple movada planado diverskampe. Tamen, tiaj taksoj estas pli aŭ malpli firmaj divenoj. Kiam temas pri informo al la ekstera mondo, pli bonas koncentriĝi pri faktoj. Ni donu al la gazetaro kredindan impreson. Se ni donos al ili sciigojn evidente dubindajn, kial ili estu akceptemaj pri nia ĉefa mesaĝo?

La artikolon verkis S-ro Torstein Kvakland. Iam ĝi aperis en la gazeto Norvega Esperantisto.

Trajnvojaĝo tra Siberio al Ulanbatoro

(Mongolio) - junio 2010

Komence de 2010 mi legis tre interesan artikolon pri ideo de Tatjana organizi trajnvojaĝon per Transsiberia Trajnlino de Moskvo al la 6-a Azia Esperanto-Kongreso en Ulanbatoro, la ĉefurbo de Mongolio. Mia revo! Tatjana estis la organizanto de la vojaĝo. Mi aliĝis! Tatjana sendis tre regule interesajn cirkuleraĵojn pri siaj planoj. Mi aranĝis flugbiletojn, vizojn por Rusio kaj Mongolio, pagis mian kotizon pere de Western Union al Tatjana. Ankaŭ Pieter Engwirda el Nederlando aliĝis, kaj ni kune vojaĝis la 7-an de junio al Moskvo. Tatjana atendis nin kun pluraj aliaj esperantistoj. Per trajno kaj metroo ni vojaĝis al nia hotelo. La metrostacioj estas belaj, sed kiom da ŝtuparoj! La 8-an de junio ni kolektiĝis en la halo. La grupo estis kompleta. Entute estis 24 homoj: geedza paro el Portugalio, italo, multaj francoj, usonano, belgo, kaj du nederlandanoj. La plej aĝa estis 81-jara!

Du plenplenaj tagoj en Moskvo atendis nin. Mi vizitis la plej gravajn turistajn monumentojn. Esperantistoj el Moskvo helpis al Tatjana. 'Rapidu, rapidu' Tatjana ofte diris!

La 10-an de junio fine komenciĝis la trajnvojaĝo de 6400 kilometroj! Je la 13.10 h la trajno forlasis la stacidomon. Tatjana aranĝis la lokojn en la kupeo. Mi estis kun Pierre kaj Marco. Unu lito restis libera. Sub la benko estas kesto, en kiun oni povas meti kofron. Alia loko por kofroj estis supre, kiu fakte estis super la koridoro. En ĉiu vagono laboras inoj, kiuj prizorgas la varmegan akvon, purigas la

koridorojn kaj fermas la necesejojn duonhoron antaŭ la alveno en stacidomo kaj malfermas ilin nur duonhoron post la forlaso de stacidomo. En la vagono estas skemo de trajnhoraro, do mi scias kiam mi ne povos uzi la necesejojn! Ne estis duŝeĵo, nur akvujo por iom lavi sin!

La panoramo estis bela, belega. Kelkfoje ebena, aliffoje iom da montetoj, kaj vilaĝoj kun bestoj. Industrio ĉe la urboj. Sed ĉiam kaj ĉie betuloj. Miloj da betuloj! Riveroj, kampoj kun bovinoj.

Mi ne havis tempon por legi. Mi rimarkis, ke legante mi ne povas rigardi eksteren! Kaj tio pli gravas por mi! Librojn mi povus legi poste. Ofte ni interparolis aŭ en la kupeo aŭ en la koridoro aŭ en la restoracio. En la restoracio estis nur ruslingva menuo, sed dank' al Tatjana ni povis mendi niajn manĝaĵojn. Plej ofte estis en la restoracio nur homoj el nia grupo. Por la rusoj verŝajne la prezoj estas tro altaj.



En kelkaj stacidomoj la trajno haltis 20 aŭ 45 minutojn. Sur la kajo venis rusoj por vendi plej diversajn aferojn: kristalajn lampojn, glasojn, sed ankaŭ remburitajn rabobirdojn. Feliĉe por ni – abundas je kukoj, fruktoj, manĝaĵoj, kolbasoj, trinkaĵoj (akvo kaj biero). En nia kupeo ni

poste bone manĝis kaj trinkis.

Post tri noktoj ni alvenis al Krasnojarsk, 4104 km de Moskvo. La Esperanto-grupo tie akceptis nin entuziasme. Ni restis unu nokton en hotelo. La esperantistoj aranĝis agrablan programon: vizito al muzeo, promenado tra la urbo, manĝo en memserva restoracio. Unu esperantistino faris patkukojn (blinoj) kun ruĝa kaviaro. Vespere ni ĝuis internacian vesperon. Francoj kantis, rusoj gitarludis kaj kantis. Pieter dancis. Mi kunportis kdon de Kajto – Lokomotivo, rulu nun! Mi aŭskultigis kelkajn kantojn kaj poste donacis la kompaktdiskon al la klubo.

Nova nokto en la trajno sekvis.

Frumatene ni alvenis en Irkutsk, 5184 km de Moskvo. Loka esperantisto Konstantin atendis nin. Vojaĝagentejo prizorgis nian restadon en Irkutsk kaj la ekskurson al la insuleto Olkhon en Bajkalo. Estis bela lago kun interesa insulo. Nia tranoktejo estis iom primitiva, sed la ĉirkaŭaĵo estis bela. Vespere kun ekstera fajro kaj vodko! Mi bone varmiĝis.

Ni faris belan tuttagan boatekskurson sur Bajkalo. Suno, iom da vento. En la lago vivas speciala fiŝo, omul-fiŝo. Ni manĝis ĝin preskaŭ ĉe ĉiu manĝo. Hm, ne dum matenmanĝo. Tiam rusoj ŝatas manĝi (aven)kaĉon!

La vojaĝo de Irkutsk al Ulanbatoro daŭris du noktojn. Ĉe la limo de Rusio al Mongolio ni devis atendi naŭ horojn entute. Sed se vi matene vekiĝas, malfermas la kurtenojn kaj vidas la ebenaĵojn kun jurtoj kun ŝafoj kaj ĉevaloj – tio donas specialan senton: jen Mongolio!

La 19-an de junio, je la 6h10 la trajno alvenis en Ulanbatoro. Ĝustatempe, neniu prokrasto. La LKK atendis nin kaj

veturigis nin al la kongresejo Chingis Khan. Mi mendis ĉambron en tiu hotelo kaj je la 7-a horo mi jam estis en mia ĉambro kun bona duŝejo! Kia ĝojo! Tatjana estis feliĉa, ke ŝia tasko finiĝis!

Ludo de la Nuda Vero

Marulino (Marlijne) Hemelaar sendis anoncon al la esperantistaro pri nova ludo:

Publikiĝis nova ludo en Esperanto: la "Ludo de la Nuda Vero". Ĝi estas tradukita el nederlanda ludo "Billen Bloot Spel" de eldonejo Atalanta. Mi ĝin tradukis kunlabore kun Rob Moerbeek.

Ludo de la Nuda Vero estas kartludo kun demandoj pri politikaj opinioj, personaj elektoj kaj banalaĵoj:

- Ĉu vi pensas mem?
- Ĉu bestoj povas pensi?
- Ĉu puni utilas?
- Ĉu eblas honeste disdoni la prosperon inter la homaro?

La celo de la ludo estas kune paroli, kune diskuti kaj kune pensi.

Mi (Marulino) esperas, ke la ludo estos bona kontaktilo inter esperantistoj en la tuta mondo, kaj fonto de plezuro kaj instruo.

Stichting Kune

[Samen] maken we het verschil

In Zijldijk, een dorpje in het noorden van Groningen, is stichting Kune gevestigd. Kune is een kleinschalige zorginstelling. Zij biedt wonen en werk aan mensen met een extra zorg- of begeleidingsvraag in het agrarische gebied van Groningen. In hun visie staat het woord 'samen' centraal: 'Samen maken we het verschil'. En zo zijn ze ook op de naam van de stichting gekomen: Kune.

Tijdens de 5-meimanifestatie zagen zij onze stand met Esperanto-informatie en vroegen ze ons voor de officiële opening op zaterdag 19 juni 2010. Dus vertrokken Nelly en Johan op een natte en koude zaterdagochtend naar Zijldijk met in de auto een paar kratjes Esperantodocumentatie, zoals boeken, vlaggen en folders.

Die zaterdag was de laatste koude dag voor de hitte van juli. Ook regende het af en toe. Niet veel, maar net voldoende om de boeken te moeten afdekken met een stuk plastic. Tijdens de officiële opening was het gelukkig droog en waren er tamelijk veel mensen. Door het slechte weer bleven de mensen niet hangen. Later werd het dus erg rustig: het orkestje van zes man stond te spelen voor acht mensen, de acht mensen die zelf een standje bemanden. Met die andere standhouders hebben we natuurlijk veel gepraat. Of er iemand Esperanto gaat leren? Geen idee, maar Nelly gaat wel naar een cursus speksteensnijden die een andere standhouder aanbood. Toch heeft vrijwel iedereen uit Zijldijk ons gezien. Niet alleen omdat veel mensen naar het

nieuwe onderkomen van Kune zijn gekomen, maar ook naar het naastgelegen dorpshuis. Daar werd op een groot scherm naar de voetbalwedstrijd Nederland-Japan gekeken.



Als bedankje kregen we enige weken later een Kune vogelhuis toegestuurd. Met een invliegopening van 30 mm is het een vogelhuisje voor een koolmees. Het is van karton en wordt aan alle vrienden van Kune toegestuurd.

De directeur van Kune heeft al aangegeven ons in het najaar graag weer te zien. Ze willen dan met een workshop Esperanto aandacht voor onze taal vragen.

Visie

Samen maken we het verschil.

Iedereen heeft recht op een gelijkwaardig burgerschap in deze maatschappij. Centraal staan de mogelijkheden van alle betrokkenen, bewoners en werknemers. Elk vanuit individuele wensen en mogelijkheden verbonden met de gemeenschap om zich heen.

Het leven op het platteland geeft verbinding met de natuur. Hierin liggen rust, regelmaat, ruimte en reinheid verankerd als gezonde basis.

KELI-kongreso

Komence de aŭgusto mi partoprenis en KELI-kongreso en Beregdaróc en la oriento de Hungario. Ĉeestis 40 partoprenantoj el 10 landoj, diversaĝaj kaj diversreligiaj. La etoso estis tre bona, la programo sufiĉe interesa. La varmeco ne tre ĝenis nin, ĉar en la kongresejo la temperaturo estis malpli alta ol ekstere, kaj en la naĝejo, kiu apartenis al la kongresejo, estis tre agrable!

La nova kongresejo estis komforta, la manĝaĵoj bongustaj, la prelegoj kaj la ekskursoj interesaj. La adiaŭa vespero estis tre agrable! Kongreso malgranda estas ĉiam pli intima ol granda. Ne mirinda do estis diraĵo de juna novpartoprenanto fine de la semajno: la kongreso sentigis nin granda familio.

Post la kongreso mi gastloĝis ankoraŭ kelkajn tagojn ĉe Esperanto-amikino en Budapeŝto.

Ĉar ankaŭ kelkaj aliaj partoprenintoj restis tie ankoraŭ kelkajn tagojn, ni renkontiĝis tagon post la kongreso kun deko da partoprenintoj por kune trinki kafon. Retmesaĝoj kaj fotoj estas nun forsendataj kaj ricevataj.

Venontjare okazos samspeca kongreso en la urbo Podebradi en Ĉeĥio de la 2-a ĝis la 9-a de aŭgusto 2011. Aliĝkotizo estos, depende de la lando kie oni loĝas, 20/40 eŭroj, la restado 140/220 eŭroj por la tuta semajno. Aliĝilon oni povas peti de cea.palnicky@quick.cz. KELI signifas Kristana Esperanto-Ligo Internacia.

Wil van Ganswijk-Vlasblom.

Boem

Estas 33 nombroj kiuj estas divideblaj per 3 kaj estas 10 nombroj kiuj finiĝas je 3.

Se vi simple kalkulas $33+10$ vi eraras ĉar ekzemple 63 finiĝas je 3 kaj divideblas per 3, kaj tiujn nombron vi nun kalkulis dufoje.

La similo okazis je 3, 33, kaj 93.

Do la solvo de la enigmo estas

Ĉ: $39 = 33+10-4$.

3 6 9 12 13 15 18 21 23 24

27 39 33 36 38 42 43 45 48 51

53 54 57 60 63 66 69 72 73 75

78 81 83 84 87 90 93 96 99

Ŝnuro ĉirkaŭ la tero

Komence vi havas ŝnuron de longeco L . Ĝi estas kiel cirklo ĉirkaŭ Tero. Kaj la radiuso de la cirklo estas R , kiu egalas $L / (2 \pi)$, ĉar la perimetro L de cirklo estas $2 \pi R$.

Post aldono de unu metro da ŝnuro, la ŝnuro havas longecon de $L+1\text{m}$. Kaj tiam la ŝnuro ŝvebas super Tero. La radiuso de la nuna cirklo estas $(L+1\text{m}) / (2 \pi)$.

Tio estas la radiuso $R = L / (2 \pi)$ de la antaŭa cirklo plus $1\text{m} / (2 \pi)$. La diferenco estas la distanco inter la ŝnuro kaj Tero. Tio estas preskaŭ 16 cm, do proksimume la alteco de kato.

ESPERANTO NOORD-NEDERLAND
T.W.S. Mansholtstraat 25
9728 MC GRONINGEN



ESPERANTO – taal zonder grenzen